



ĜENERALA MEMBROKUNVENO

Kunsido de la 27a de majo 2017

Sabaton la 27an de majo 2017, de la 9a00 ĝis la 10a30, kunsidis en Mandres-les-Roses la Membrokunveno de Esperanto-France. ĉeestis 41 homoj (+ 11 povoj).
Prezidis: Aleks Kadar (AK). Protokolis: Sylvain Barrier (SBa), kun helpo de Anne-Emilie Ravache (AER).

1. REZULTO DE LA VOĈDONOJ

Agada raporto 2015-2016

La agada raporto legeblas ĉere: <http://esperanto-france.org/rapport-annuel-2015-2016>

Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	0
Valide voĉdonis:	240
Sindetenis:	19
JES:	219
NE:	2

⇒ **Agada raporto aprobita**

Financa raporto 2015-2016

La financa raporto legeblas ĉere: <https://esperanto-france.org/finances/2016/>

Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	0
Valide voĉdonis:	240
Sindetenis:	20
JES:	218
NE:	2

⇒ **Financa raporto aprobita**

Parta renovigo de la Komitato

8 homoj kandidatiĝi por renovigo de la duono de la Komitato (t.e. por 8 postenoj el 16):

Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	0
Valide voĉdonis:	240
Postulita minimumo :	121
Sylvain BARRIER:	238
Claude BENSIMON:	235
Didier JANOT:	233
Maurice JUY:	235
Claude NOURMONT:	237
Emmanuelle RICHARD:	236
Axel ROUSSEAU:	240
Gilles TABARD:	238

⇒ Ĉiuj 8 kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al ili kaj bonvenon en la Komitato!


2. FINANCO

Financaj rezultoj (en eŭroj, laŭ jaro)



Profita bilanco en 2015 dank' al la UK en Lille.

Bankkonto ĉe CIC: rezultoj (en eŭroj, laŭ jaro)



Espéranto-France fermos tiun konton pro tio, ke ĝi estas parte en borso (riskaj kaj etikaj kialoj).

La asocio jam havas 2 ŝparkontojn:


- Caisse d'Épargne - Livret A: 85 579,45€ (oni ne rajtas aldoni monon)
- Crédit Coopératif - Compte sur livret Epidor: 26 759,60€

Neniu alia banko proponas pli altajn interezojn.

La venonta kasisto devos ĝiri la monon de CIC al Crédit Coopératif.

/!\ Oni atentu pri la eventuala kosto de la fermiĝo.

Membraraj statistikoj



Le Monde de l'Espéranto: nova dissend-sistemo


(ekde oktobro 2016)

Rete: senpage por ĉiuj.

Papere grupe kaj **amase:** sendita senpage al la federacioj, kluboj kaj asocioj, kaj al mediatekoj kaj bibliotekoj (same kiel antaŭe).

Papere unuope: sendita senpage al izolataj membroj *se petita*.


Rezultoj de la nova sistemo:



Financa stato de LME:

Presado de LME:

- ĝis 2016: financita de abonoj;
- ekde okt. 2016: financita de specifaj donacoj.



Rimarko de la publiko:

Ne povante garantii donacojn por LME, ni devas tre proksime kontroli, ke la sistemo plu profitdonas estonte.

Franca Interasocia Kotizo

10 lokaj kluboj partoprenas al la Franca Interasocia Kotizo: Albertville, Bourg-en-Bresse, Béziers, Dôle, Gap, Marseille, Moûtiers, Nîmes, Périgueux, Strasbourg... kaj la via: kiam?

La kotizo entenas 10 eŭrojn por EF (kiu reĝiras 1 eŭron al EEU, eventuale 1 eŭron al GEE...); EF sendas impostatestilon al la aliĝantoj.

Prognoza buĝeto por 2017-2018

Interna kaj eksterna komunikado	2 000 €	Kotizoj	20 000 €
Revuo	4 000 €	Donacoj	12 000 €
Libroservo	14 000 €	Libroservo	16 000 €
Universala Kongreso	20 000 €	Universala Kongreso	22 000 €
Trejnado de instruistoj	1 000 €	Nacia kongreso	2 000 €
Salajro	25 000 €	Bankaj interezoj	2 000 €
Elspezoj de la sidejo	8 000 €		
Elspezoj	74 000 €	Enspezoj	74 000 €

Rimarkoj de la publiko pri la buĝeto:

- Trejnado de instruistoj: tro malmulte en la buĝeto por esti efike.
→ Ni aldonis tiun linion al la buĝeto pro konsiloj de ĵusa laborkunsido sed ni devas trovi enspezoj por ekvilibri.
- Kio pri la repago de la UK en Lillo 2015?
→ Neniu respondo de UEA, sed la UK estis profitdona. Ni devas postuli daton kaj sumon de UEA.

3. AGADOJ

Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado (ERIK)


Informoj kolektitaj tra diversaj dissendolistoj kaj sociaj retoj.

Aperas sur la retejo de EF: <http://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse>

Mankantajn ligilojn kaj skanaĵojn sendu al: presse@esperanto-france.org

Okazis kelkaj freŝdataj radioelsendoj ĉe RTL, France-Inter, RAM 05 (Radio Libre), RadioJM.fr, Radio Zinzine, ktp.

Vizitoj al nia retejo: www.esperanto-france.org



Du "pikoj":

- ĉirkaŭ la 14a de aprilo, pro la 100a datreveno de la morto de Zamenhof;
- post la 5a de majo, pro franca video ĉe Jutubo (https://youtu.be/M2-gzuFg9_8).

Esperanto-Aktiv'

Informletero sendita (ĉefe rete) ĉiumonate al pli ol 4000 homoj, kvankam nur ĉ. 100-200 legantoj.

Kvar artikoloj:

- "Découvertes": ĉefartikolo pri la Esperanto-kulturo, intervjuoj kun Esperanto-aktivuloj;
- "Ils l'ont fait...": raportoj pri pasintaj eventoj;
- "Calendrier": anoncoj de venontaj eventoj;
- "Lu, vu, entendu": recenzo pri libro, KD, ktp.

Bonvolu sendi al esperanto-aktiv@esperanto-france.org: ĉu recenzon, ĉu anoncon de venonta evento, ĉu raporton pri pasinta evento, eĉ ĉu temon/ideon por venonta ĉefartikolo.

Enhavo de LME

Bonvenas recenzojn pri novaj libroj ĉu en Eo ĉu en la franca.

Estis pli da artikoloj en la franca antaŭe : ili plu bonvenas.

Posta numero de LME: ĉefe pri Zamenhof, ĉu duobla numero?

→ ni verku en la franca por reklami ekstere, por diskonigi Eon

Venontaj kongresoj

Jen proponoj:

2018: en Sarbruko, kune kun GEA (je la memoro de la fino de la unua mondmilito)

2019: en Rouen

2020: en Pluezeko, komuna kunkongreso inter EF, SAT-Amikaro kaj la fervojistoj

Projektoj de venontaj eldonoj

Metodo 11: lernolibro renovigita nun de Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau (ĝisdatigo, purigado, nova desegnaĵoj, ktp.)

La Eta Princo: elĉerpigo baldaŭ; ĉu reeldoni?

La Eta muso en Bretonio: bildstrio ĵus tradukita de Michel Dechy, eldonita dank' al la klubo de Lille-Villeneuve-d'Ascq.

Rimarko de la publiko: Mankas al komencantoj dulingvaj libroj (Eo-Fr)

Jam ekzistas *Fifi la Ŝafino*.

Estas debato ĉu tiaj libroj tre valoras pedagogie.

Sed almenaŭ dulingvaj libroj utilas por diskonigi Esperanton kaj la penson de Zamenhof, por la ekstera publiko.

